

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №2



Agrablan Kongresan Sezonon!

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №2 (324)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2025

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 34 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2025, №2 (324).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 3 июля 2025 г.

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto”	2
En ĉi tiu numero	3
Redakcie	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Jam ok patronoj kaj 21 amikoj por 2025	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. “La Ondo” denove abonebla per PayPal.....	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Du mil tagoj da ĉiutaga informado en “La Ondo”	6
Aleksander Korĵenkov. La plej populara Esperanto-kanalo en Telegramo	7
Eventoj	8
Tim Owen. Memor(inde) en Manĉestro	9
Bruno Robineau. Franca kongreso: Vojaĝoj realaj kaj fantaziaj	12
Bruno Henry. Interkultura Festo en Vigy.....	14
Herbert Kampl. La aŭstria kongreso: La popoloj vivu en paco	17
José Antonio del Barrio. La Hispana Kongreso omaĝis al Rafaela Urueña	19
Spomenka Štimec. La 13a kongreso de kroataj esperantistoj.....	20
Magdaléna Feifčiová. Fervojistoj kongresis en Žilina.....	22
Adam Wilkus. Esperantaj Tagoj de Krakovo.....	24
La PSI-teamo. La 41a Paska familia renkontiĝo	27
Bert Schumann. Kastelo Greziljono neniam dormas	29
Jorgos. Du ZEOj en la sama tago inaŭguritaj en Pireneoj.....	31
Michel Basso. Esperanto-panelo apud la Giganta Benko en Alzaco	32
Julia Mul. APERo: Mia unua Esperanto-renkontiĝo en Ruslando	33
Irina Gonĉarova. Sperto en la Somera familia tendaro	34
Paulo S. Viana. Denove en la Paraiba Valo	36
Alessio Giordano. Lingva kolokvo en la Esperanto-domo	37
Povilas Jegorovas. Grava renkontiĝo en la Litovia parlamento	38
TEJO kaj FoJE kontraŭ internacia lingva diskriminacio	39
TEJO gvidis “Kukumion” en la Eŭropa Parlamernto.....	40
Fernando Maia estos prezidanto de UEA dum 2025-28	42
Aleksander Korĵenkov. Membrostatistiko de UEA en 2024	43
Aleksander Korĵenkov. Pli ol mil aliĝintoj al la kongreso en Brno	45
La 111a UK okazos en 2026 en Graz.....	46
Povilas Jegorovas. Juozas Olekas – Alta Protektanto de BET-59.....	47
Paweł Fischer-Kotowski. Kunfluo: Ĉiutaga informilo de BET-59	48
Aleksander Korĵenkov, Povilas Jegorovas. Kaŭno superis Klajpedon: Jam 268 aliĝintoj al BET-59	49
La 11a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto	50
Kultura Esperanto-Festivalo	51
Karstaj tagoj 2025.....	51
KLERo-2: Klerigo per kreado	52

Pola Esperanto-Kongreso.....	53
Koncize (8 novaĵoj).....	54
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	55
Tribuno	56
Vida Labanauskienė. De sukceloj ĝis steloj: La jaro de Čiurlionis (Trad. el la litova Aida Čizikaitė kaj Gražina Opulskienė)	57
Dennis Keefe. Esperanto-Plaĝo 2025: Kio, Kia kaj Kial	60
Jado (Wei Yubin). Suna Esperantisto-Knabino	66
Philipp Sonntag. Eŭropo bezonas Simplan Eŭropan Lingvon.	67
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj	69
Biblioteka Apogo Bachrich: alvoko 2025	69
Peter Zilvar. Esperanto-urbo: Kunkreantoj, kunaktivuloj serĉataj	70
Arkivo	71
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2025.....	72
Wolfgang Kirschstein. Paco por popolo de diabloj.....	75
Kulturo	80
Aleksander Korĵenkov. Konstantin Paustovskij, honesta inteligenciano en la lando de sovetoj	81
Konstantin Paustovskij. Flava lumo. Adiaŭo al somero. Neĝo. La telegramo. Korbo kun abiaj konusoj (Tradukis el la rusa Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, V. S. Neminem, Ludmila Novikova)	83
Paulo Sérgio Viana. La unua tago	113
Miguel Fernández. Poezio de Sorio	116
Wolfgang Kirschstein. Kaj pro tiaj limoj la homoj mortigas unu la alian (Recenzo: Sten Johansson. Neŭtrale).....	123
V. S. Neminem. Traduku! (Recenzo: William Auld. Traduku!).	125
Paŭlo Moĵajevo. Eta, sed simpatia aldonajo al la rimarkinda albumo (Recenzo: Kjara. Nuda)	127
Bernhard Westerhoff. “La Sep Valoj”: la centra mistika verko de Bahá’u’lláh aperis en Esperanto.....	129
Cho Sung Ho. Rakontaro de Genĝi: verko kiu nutras nian kulturon	130
Aleksander Korĵenkov. Literatura Vivo debutas	131
Literatura Foiro. 2025, №335.....	131
Literatura Konkurso EKRA-25	132
Kandidatigu verkojn por la Laŭro de la Akademio	133
Mozaiko	134
Stanislav Belov. Oni estas riĉa neniam sufiĉe.....	135
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	136
Perantoj de “La Ondo de Esperanto”	137

Kovropaĝe: Ĉi tiu reklambildo farita de Boguslaw (Germanio) kun helpo de AI, estis prezentita dum la festo de asocioj en la urbo Colmar (Elzaco, Francio).

Jam ok patronoj kaj 21 amikoj por 2025

Je la stato de la 1a de julio “La Ondo de Esperanto” ricevis por la abonjaro 2025 donacojn de 8 patronoj kaj 21 amikoj, danke al kiuj jam 21 personoj ĉi-jare senpage ĝuas la legadon de “La Ondo”. (En 2020 estis 4 patronoj kaj 18 amikoj, en 2021 – 3 patronoj kaj 27 amikoj, en 2022 – 4 patronoj kaj 25 amikoj, en 2023 – 4 patronoj kaj 32 amikoj), en 2024 – 6 patronoj kaj 29 amikoj).

Patronoj (100 eŭroj):

Jean-Luc Tortel (Francio), Benoît Philippe (Germanio), Werner Pfennig (Germanio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Syôzi Nobuyuki (Japanio), Geoffrey Greatrex (Kanado), István Ertl (Luksemburgio), Ilona Koutny (Pollando).

Amikoj (30 eŭroj):

Angelos Tsirimokos (Belgio), Malcolm Jones (Britio), Petr Chrdle (Ĉeĥio), Jiří Machačík (Ĉeĥio), Lydia Lindla (Estonio), Raita Pyhälä (Finnlando), Françoise Guihaumé (Francio), Julia Mull (Germanio), Margarete Bastian (Germanio), Sophia Brandt (Germanio), Ulrich Brandenburg (Germanio), Antonio del Barrio (Hispanio), Miguel Angel Bueno Avila (Hispanio), István Szabolcz (Hungario), Gražina Opulskienė (Litovio), María Mesías (Luksemburgio), Bård Hekland (Norvegio), Bo Sandelin (Svedio), Nicol Margot (Svislando), Bill Maxey (USA), Humphrey Tonkin (USA).

Se vi deziras, ke niaj gazeto kaj novaĵretejo daŭre funkciu kaj pliboniĝu, iĝu abonanto, amiko aŭ patrono de “La Ondo de Esperanto”. Pri la pagomanieroj legu ĉi tie: <https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Dankon pro la helpo!

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

“La Ondo” denove abonebla per PayPal

“La Ondo de Esperanto” estas sendependa internacia gazeto, kiu aperas ĉiusezone sur 120-140 paĝoj laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”. Jarfine la abonantoj de “La Ondo” ricevas senpagan literaturan suplementon.

“La Ondo de Esperanto” estas abonebla por 2025. Estas tri abonkategorioj:

1. Abonanto – 15 eŭroj; 2. Amiko – 30 eŭroj; 3. Patrono – 100 eŭroj.

La baza abontarifo restas senŝanĝa ekde 2007. Dum kelkaj lastaj jaroj oni povis sendi la abonpagon nur al niaj landaj perantoj kaj al nia UEA-konto. Sed ne en ĉiuj lando estas perantoj, kaj ne ĉiu abonemulo havas konton ĉe UEA.

Bona novaĵo: Oni denove povas aboni la “Ondon” per la internacia pagosistemo PayPal ĉe <https://paypal.me/GGORETSKIY>.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

Du mil tagoj da ĉiutaga informado en "La Ondo"

La 22a de junio 2025 estis la 173a tago de la nuna jaro. Tio signifas, ke je tiu tago jam dum du mil (2000) sinsekvaj tagoj (= kvin jaroj + kvin monatoj + 22 tagoj) ekde la 1a de januaro 2020 en nia novaĵretejo ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. Ni memorigas, ke ĉi tiu novaĵretejo estis lanĉita la 2an de septembro 2010 kiel "La Balta Ondo". Ekde tiam en ĝi aperis 4051 tekstoj. Ilin garnas pli ol kvin mil (5308) ilustraĵoj.

Laŭ nia vizitkalkulilo, instalita komence de 2020, la plej ofte vizitita afiŝo (7 mil 481 vizitoj) estas la artikolo de la ĉefredaktoro de "La Ondo de Esperanto" pri la Ruslanda censo, verkita en decembro 2011. Ĝi estas la sola teksto, vizitita pli ol sep mil fojojn. En la dua loko estas la Korĵenkova artikolo pri la lastaj vivojaroj de Zamenhof (5.198); ĝin sekvas la diskutartikolo "Granda skismo en Esperantujo" (5.050) de la Tjumena ĵurnalisto Stanislav Belov – ambaŭ artikoloj ĉi-jare superis la nombrojn 5000.

Entute, dum la lastaj du mil tagoj jam 17 artikoloj estas legitaj (t. e. malfermitaj) pli ol tri mil fojojn, el kiuj sep artikoloj (ok antaŭ cent tagoj) legiĝis pli ol 4000 fojojn. Antaŭ mil tagoj, je la "Miltagiĝo" de nia ĉiutaga informado, nur tri tekstoj superis la nombrojn tri mil.

Vidu la liston de la dek kvin plej popularaj tekstoj en nia retejo.

- 7.481. Korĵenkov A.: Kiom da esperantistoj en Ruslando? Ne malpli ol 992
- 5.441. Korĵenkov A.: Ho, mia kor', ne batu maltrankvile...
- 5.193. Belov S.: Granda skismo en Esperantujo
- 4.456. Korĵenkov A.: La Unua Libro
- 4.283. Korĵenkov A.: Antaŭ 125 jaroj: Tolstoj kaj la unua Esperanta gazeto
- 4.107. Gorecka H., Korĵenkov A.: Sen Rodin sekvis sian edzinon
- 4.051. Gorecka H., Korĵenkov A.: Júlia Sigmond forpasis
- 3.822. La 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj
- 3.712. Etsuo Miyoshi: Politikistoj de EU kaj Esperanto
- 3.603. Korĵenkov A.: Konciza biografio de Lazarj Markoviĉ Zamenhof
- 3.557. BET-59: La unua informilo
- 3.537. Belov S.: La pandemio kaj la homaro: konkludoj de la viruso
- 3.181. Martorell F.: Katastrofo ĉe Vinilkosmo
- 3.166. Gorecka H., Korĵenkov A.: Nia diligenta kolegaro: La nomlisto
- 3.140. Korĵenkov A.: La lasta ARKONES

"La Ondo de Esperanto" jam dum kvin jaroj aperas dumaniere: unue, kiel ĉiutage aktualigata novaĵretejo; due, kiel ampleksa (120-140 paĝoj) trimonata bitgazeto en kiu estas publikigataj la plej gravaj tekstoj el la novaĵretejo kaj ankaŭ artikoloj, eseoj kaj beletraĵoj, verkitaj speciale por la gazeto.

“La Ondon” pretigas en Kaliningrado Halina Gorecka (eldonanto) kaj Aleksander Korĵenkov (redaktoro).

Malkiel la novaĵretejo, kiu estas senpage legebla de ĉiu deziranto, la gazeton ricevas nur tiuj, kiuj abonas ĝin. Ekde la enkonduko de la bitversio en 2007 (tiam nur pdf, nun pdf kaj ePub) la baza abontarifo (15 eŭroj) ne ŝanĝiĝas dum 18 jaroj.

Ĝis nun neniuj esperantista asocio, instanco aŭ fondaĵo subtenis la solan ĉiutage renovigatan Esperantan novaĵretejon. Ĝia funkciado dependas nur de la helpemo de tiuj, kiuj abonas la ĉiusezonan gazeton “La Ondo de Esperanto”. Se vi ne abonas ĝin, sed deziras helpi la novaĵretejon, abonu ĝin aŭ abonigu via(j)n amiko(j)n aŭ vian klubon/asocion por 2025.

Dankon pro via subteno!

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

La plej populara Esperanto-kanalo en Telegramo



Telegramo estas senpaga nuba tujmesaĝilo por komputiloj kaj poŝtelefonoj. Esperantistoj uzas ĝin por sendi tekstajn kaj voĉajn mesaĝojn, kaj por telefonvoki kaj videovoki aliajn parolantojn. Eblas sendi per ĝi ĉian enhavon: bildoj, filmetoj, movbildoj, glumarkoj kaj dosieroj. En Telegramo funkcias *grupoj*, en kiuj esperantistoj interparolas pri diversaj temoj, kaj *kanaloj*. Kanalo estas unudirekta loko kun mesaĝoj pri difinita temo. Ĉiu kanalo havas specifan temon. Malkiel grupo, kanalo ne estas loko por diskuti, sed por informiĝi pri difinita temo, sed ĉe la kanalo “Esperanto-novaĵoj” funkcias samnoma grupo/babilejo.

La 13an de julio 2023 estis fondita la Telegrama kanalo “Esperanto-novaĵoj” (https://t.me/esperanto_news). La 23an de septembro 2023 al ĉi tiu kanalo aliĝis cent abonantoj, kaj antaŭ la jarfino ĉi tiu nombro superis 200. En aŭgusto 2024 la abonantaro superis 400, kaj je la 30a de junio 2025 la kanalon “Esperanto-novaĵoj” abonas 647 personoj, kiuj ĉiutage ricevas kurtajn mesaĝojn, plejparte pri novaj publikaĵoj en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” <https://sezonoj.ru>.

Kun 647 abonantoj “Esperanto-novaĵoj” nun estas la plej populara Telegram-kanalo en Esperanto. En marto ĝi devancis la antaŭe unualokan Esperanto-kanalon “Esperantaj memeoj” kiu nun havas 557 abonantojn, sed la plej freŝa informo en ĝi estis publikigita la 25an de junio 2024. En la tria loko estas “Libera Folio” (361); ĝin sekvas “Kontraŭ Espero” (348).

Se vi uzas Telegramon kaj vin interesas novaĵoj pri Esperanto kaj esperantista agado, aliĝu al la kanalo “Esperanto-novaĵoj” ĉe https://t.me/esperanto_news.

AIKO

Eventoj



Veronika Ivanova, 13-jara lernantino el Moskvo, rolas la Damon en la teatraĵeto “La provizo”, prezentita de infana grupo, gvidita de Irina Gončarova, en la infana biologia tendaro ĉe la lago Ĉistoje; vd. p. 43-44.

Memor(inde) en Manĉestro

La 105an Britan Kongreson de Esperanto gastigis neantaŭvideble sunbrila Manĉestro, depende de la prefero la dua aŭ tria plej granda urbo de Anglujo, de la 4a ĝis la 6a de aprilo. La ĉefinvitito Tonjo del Barrio eĉ rimarkigis sian surprizon, ke, fluginte de Madrido, li elaviadiliĝis en klimaton multe pli hispanecan, ol tiu ĉirkaŭ li du horojn antaŭe.

Rememorante Renaton

Aliĝis al la kongreso 62 esperantistoj, el kiuj bona proporcio troviĝis ĉe Pendulum Hotel en la urbocentro jam en la vendreda vespero. Kiel kutime en la unua vespero, kongresanoj ĝuis leĝeran kvizon, informite, ke la premio estos donaco de EAB al Fondaĵo Afriko de UEA, memore al Renato Corsetti. Rezulte, EAB baldaŭ poste devis ĝiri £ 575. (Aldoniĝis tri laŭkapricaj demandoj dumkvize, kio plialtigis la maksimumon.)

Postkvize enekraniĝis triparta prezento pri Renato Corsetti: videaĵo de fotoj de la junaj tagoj; mesaĝo de Humphrey Tonkin pri sia kamarado; kaj plia videaĵo, ĉi-foje de Renato en la dua duono de la vivo. La tostado al la forpasinto ne estis nur metafora; atendis ekster la ĉambrego boteloj da vino kaj multe da glasoj.

Finiĝis la vespero per sociumado inter amikoj novaj kaj malnovaj. Pendulum Hotel ofertas abundajn fotelojn kaj sidlokojn, kio plifaciligis la interkoniĝadon dum la tuta semajnfino.

Programer-pleno

La kongreso oficiale malfermiĝis en aparta sesio je 9a horo sabate. Tio sekvigis tri sesiojn: Elizabeth Stanley pasigis du horojn kun la novuloj; grupeto ne povis ĝisatendi la lanĉon de nia nova libro “Rebecca” en traduko de Malcolm Jones, kaj do laŭtlegis la unuajn paĝojn kun Stela Besenyei-Merger en Legosalono; kaj Tonjo del Barrio restis en la ĉefa ĉambro kun la plimulto, prezentante la unuan el siaj tri kontribuoj: “Geniaj esperantistoj”.

Post la kafpaŭzo Stela Besenyei-Merger prezentis “Renato tra la okuloj de denaskulo”, dum Jack Warren en alia ĉambro prelegis pri Adolphe Valette kaj liaj pentraĵoj de Manĉestro.

Kontribuis partoprenantoj

Dum 90 minutoj estis paŭzo en la programo: sufiĉe da tempo por ebligi al homoj trovi restoracion, kaj por tiuj, kiuj preferis manĝi surloke, ĝui aliulan kompanion ripozante.

La posttagmeza programo promesis ion por ĉiuj: ludemuloj aliĝis al Roberto Garcia kaj la novuloj por “Lernu ludante!”; Clare Hunter malfermis la libroservon, kiun ŝi gvidis dum la cetero de la tago; kaj “Rebecca” oficiale lanĉiĝis, kiam Malcolm



Fulmprelegas Gabriel Beecham, la nova prezidanto de EAB (Foto: Gregory Chamberlain)

Jones prezentis “Rebecca retrovita”, sian sperton pri la tradukaj tiklaĵoj de tiu ĉi aparte malfacila libro, klasikaĵo de la angla literaturo.

Tion sekvis sesio, en kiu la kongresanoj fariĝis kontribuantoj: Fulmprelegoj! Entute prezentis 12 homoj, dum po kvin ĝis sep minutoj, kvankam en la realo preskaŭ ĉiuj havis ion pli por rakonti:

- Gabriel Beecham – Savi ies vivon en kvin minutoj.
- Zsófia Kóródy – Esperanto-floroj kaj -plantoj.
- Nicki Higgins – Aventuroj kun skoltinoj.
- Elizabeth Stanley – Harry Edward: Olimpia heroo kiu malaperis.
- Tonjo del Barrio – La fizika Esperantujo.
- Roberto Garcia – Gustavo Adolfo Bécquer (hispana poeto).
- Sally Phillips – Eric Walker (centjariĝinta brita esperantisto).
- Maurizio Giacometto – Mia semajno en Esperantujo ĉe la Lazura Marbordo.
- John Greenwood – Shiko Munakata: Japana Ksilografo.
- Mike Sadler – La Trans-Sahara Struta Ekspedicio de 1911.
- Marteno Miniñ – La 110a Universala Kongreso de Esperanto.
- Hju Rid – Herezaĵoj.

Vesperaj venkoj

La sabata programo finiĝis per amuza konkurso: “Ĉu vi volas esti milonulo?” (Ne temas pri tajperaro!) Tonjo del Barrio gvidis tri raŭndojn de la fama kvizo kun

demandoj rilate Esperantujon. Fariĝis “milonuloj” Tim Owen kaj Carolin Weemeyer: centobligis sian premion ŝi, kaj ĝin donacis al Fondaĵo Afriko: pliaj £ 100 memore al Renato! Preskaŭ venkis ankaŭ Katherine Lister, kiun stumbligis lastamamente demando diabla.

Nekonkursemaj muzikemuloj estis bonŝancaj: en alia ĉambro Jack Warren gvidis sesion “Ni muzikumu!” Partoprenis konataj vizaĝoj, interalie: Sally Phillips (ŝi ludis gitaron kaj kantis), Peter Bolwell (basgitaro), kaj Gavan Fantom (klarneto). Aliĝis ankaŭ unuafojuloj, inkluzive de Gregory Chamberlain, kiu gitarludis kaj akompanis aliajn kontribuantojn.

Nova prezidanto

Dimanĉo matene estas rakonto de du grupoj: membroj kaj nemembroj. Kiel kutime la membroj partoprenis la jarkunvenon de EAB, kiu pasis glate kaj pace. Fine de ĝi EAB havis novan prezidanton: Gabriel Beecham.

En alia ĉambro okazis por nemembroj du programeroj: Stela Besenyei-Merger gvidis plian Legosalonon, en kiu oni gustumis kelkajn paĝojn de aperigota libro “Stig de la ŝutejo”, kiun tradukis Jack Warren. Edmund Grimley Evans rapide poluris la unuan ĉapitron de la malneto ĝustatempe por enpaĝigo antaŭkongresa. Zsófia Kóródy poste prelegis pri la biblioteko kaj valora kolektaĵo de la Esperanto-Centro en Herzberg.

Brava anstataŭulo

La kongresanoj, paŭzinte por tagmanĝi, rekunvenis por la posttagmeza programo. Ĝin komencis Tonjo del Barrio per prelego “La uzo de Esperanto dum la hispana enlanda milito”. Lin sekvis Zsófia Kóródy per “Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo jam 18-jara”.

Kiel kutime la programo proponis samtempajn sesiojn aliloke. Mike Sadler debutigis siajn Babil-ludojn, senpreparajn interparolojn por ebligi en amuza etoso pli-akrigi sian parolkapablon. Stela Besenyei-Merger starigis sian trian Legosalonon, ĉi-foje nur por la novuloj: ili kune legis novan infanlibron “Toto la PINTA hundo”, lanĉitan dumkongrese.

Margaret Zaleski-Zamenhof devus prezenti en la programo, sed ŝi ne povis veturi per lastaminutaj problemoj. James Hawkey heroe plenigis la truon per “Pri la studado de soci-lingvistika variado en Esperanto”. Lin sekvis Maurizio Giacometto, kiu prezentis sesion “Renataĵoj – memore al Renato Corsetti”: ateliero en kiu oni devis “bonlingvigi” kelkajn neologismojn.

Per anonco pri la venontjara kongreso, kiu okazos en Lesterio en jaro, kiam EAB festos sian 50an jubileon, fermiĝis la sukcesinta Brita Kongreso de 2025.

Tim Owen

Detalojn pri la Brita Kongreso 2026 en Lesterio (Leicester), trovu ĉe: britakongreso.org. Specimenan tekston de “Rebecca” eblas legi ĉe <https://mallonge.net/rebecca>.

Franca kongreso: Vojaĝoj realaj kaj fantaziaj

La ĉi-jara kongreso de Esperanto en Francio okazis de la 7a ĝis la 9a de junio en la urbo Nantes ĉe la atlantika marbordo kun 150 esperantistoj el ok landoj. La organiza teamo elektis la kongresotemon “vojaĝo”, ĉar tra sia tuta historio la haveno de Nantes rilatis kun la oceano kaj la transmaraj landoj, kaj nuntempe la urbo masive investas en kulturon, interalie, per la ĉiujaraj artaj eventoj nomataj “La Vojaĝo en Nantes”. Do en Nantes oni vojaĝis reale kaj fantazie.

Jules Verne, la mondfama aŭtoro de “Eksterordinaraj vojaĝoj”, unu el la plej tradukitaj aŭtoroj en la mondo, revis pri aliejo sur la kajoj de Nantes, kie li naskiĝis. La kongresanoj povis viziti la muzeon dediĉitan al liaj vivo kaj verkaro, post prelego de István Ertl. Li rakontis pri la rilato de Jules Verne al la internacia lingvo, la rolon de Esperanto en lia lasta manuskripto “Esplorvojaĝo”, kaj kial la aŭtoro neniam finverkis tiun libron.

Ni ankaŭ sekvis la spurojn de Lucien Péraire, juna esperantista laboristo, kiu de 1928 ĝis 1932 biciklis tra Eŭropo kaj Azio por “kompreni la kialojn de la militoj”. De Germanio ĝis Japanio li parolis la internacian lingvon. Sperta teknikisto, li inventis provtipon de veturilo por bicikli sur la fervojaj reloj cele al veturado tra Siberio tiam sen ŝoseoj.

Tiu eksterordinara aventuro estis malmulte konata ĝis la freŝdata malkovro de grava dokumentaro (liaj taglibroj, fotoj, poŝtkartoj...). Escepta heredaĵo nun savita kaj disponebla por la publiko dank’ al la laboro de tuta skipo. Estas informfonto pri la mondostato, la ĉiutaga vivo de ordinara homoj ĉirkaŭ la jaro 1930, de Eŭropo ĝis Fora Oriento, tra la okuloj de juna amatora antropologo.

Pascal Dubourg-Glatigny, doktoro pri arthistorio, partoprenis tiun imponan savlaboron kiu kunigis sciencistojn kaj esperantistojn. Kadre de du prelegoj li prezentis tiujn du defiojn, tiun de la vojaĝo de Lucien Péraire kaj tiun de la savo de la arkivoj. Tiu odiseo estis ankaŭ prezentita pere de ekspozicio de paneloj malfermita al la ekstera publiko.

Se temas pri vojaĝo, ni sekvis ankaŭ tiun de Gabin, kiu petveturis tra Eŭropo dum 6 monatoj renkonte al esperantistoj; per bildoj ni iris al Tanzanio, kie dank’ al Esperanto bela interrilato kreiĝis antaŭ pluraj jaroj kun la urbestro de vilaĝo proksima al la lago Viktoria por helpi al ĝia disvolviĝo.

Sen forgesi literaturan vojaĝon al Oriento per ties fabeloj kaj legendoj rakontitaj en “La libro de la mil kaj unu noktoj”, ĉefverko de la monda literaturo antaŭnelonge eldonita en Esperanto.

Dum la kongreso oni povis ankaŭ spertiĝi pri origamio, la japana paper-faldarto, aŭ komenci la tagon bonhumore en la ateliero de ridjogo.

Dimanĉe okazis ekumena renkontiĝo, dum kiu bahaino parolis pri sia kredo, kaj la partoprenantoj legis la kortuŝan komenton de la preĝo Patro Nia, verkita de la serba ortodoksa sanktulo Nikola Velimirović. La tiutaga evangelio pri Pentekosto,

kiam la apostoloj ricevis la povon paroli alilingve, estas aparte inspira por esperantistoj (tiel ili ne plu devus barakti por regi la akuzativon!).

Ekskursoj en Nantes, iama ĉefurbo de la duklando Bretonio, ebligis konatiĝi kun ĝia historio kaj ĝiaj nuntempaj artaĵoj surprizaj, sen forgesi ĝian “nigran pasint-econ”, kiam Nantes riĉiĝis pro sia rolo kiel ĉefa franca elirpunkto por sklavŝipoj, kiuj komercis inter Eŭropo, Afriko kaj Ameriko por vendi sklavojn.

En la ne plu uzataj antaŭaj ŝipkonstruejoj nun staras fantaziegaj maŝinoj: giganta 48-tuna elefanto el ligno kaj ŝtalo, kiu promenas ĉiutage sur la placego; araneo, ĥameleono, kaj tiom da aliaj gigantaj mekanikaj bestegoj eksterordinaraj. Mondo laŭ Jules Verne...

Vespere la kongresanoj kuniĝis por la “aperitivo de la regionoj”, kiam ĉiu alportas iun manĝeblan aŭ trinkeblan specialaĵon el sia regiono. Abunda kaj festa tablo kaj ĝoja etoso. Kaj dimanĉe ni povis daŭre vojaĝi ĉetable kiam oni servis kurdan tagmanĝon.

Nokte la duopo “Abeloj” vojaĝigis la ĉeestantojn en la tuta mondo, tra landoj, kie ili rikoltis muzikojn kaj kanzonojn: juda lulkanto, tradicia greka kanto kun freneza

La Giganta Elefanto, unu el la fantaziaj maŝinoj en Nantes



ritmo, alĝeria kanzono, sveda melodio... Ili kantis diverslingve, ankaŭ en Esperanto. Kaj poste sekvis balo kun popolaj kaj bretonaj dancoj. En alia vespero “Kajto” plezurigis nin per sia energio kaj bonhumoro.

Jen komentoj de du kongresanoj:

“Mi tre ĝuis la kongreson en Nantes: kongresejo perfekta, bone funkcia trinkejo, komuna manĝo, balo por ke ĉiuj generacioj kuniĝu, tre viglaj koncertoj”.

“Mi ŝategis la kongreson; certe mi partoprenos aliajn renkontiĝojn”. Unuafoja partopreno en Esperanta renkontiĝo de komencanto 20-jara.

Entute sukcesa kongreso.

Bruno Robineau

Interkultura Festo en Vigy

De la 23a ĝis la 27a de majo 2025 en la ĉarma vilaĝo Vigy, nordoriente de Francio apud Metz, okazis du gravaj Esperanto-eventoj: la 77a SAT-Amikara Kongreso kaj la 89a Regiona Staĝo de Esperanto France-Est (EFE).

Ĉi tiu duflanka aranĝo kunigis 68 esperantistojn el pluraj landoj, proponis altkvalitajn prelegojn kaj kulturajn programerojn, kaj servis kiel modelo de internacia kunlaboro.

La kongresejo, ADEPPA, situas sur verdoplena deklivo ĉe la rando de arbaro, kie inter la konstruaĵoj trankvile paŝis ŝafoj, ĉevaloj, azenoj, anseroj kaj eĉ meleagro. La natura medio kontribuis al la afabla etoso, malgraŭ kelkaj praktikaj defioj (ekzemple, la malsamalta pozicio de la manĝejo kaj salonoj). Malgraŭ tio ĉiuj laŭdis la taŭgecon de la loko por tia evento.

Partoprenis esperantistoj el Francio, Germanio, Luksemburgio kaj Belgio, precipe reprezentantoj de SAT-Amikaro, de Luksemburga Esperanto-Asocio, de la regionaj federacioj BAVELO (Baden-Virtembergo), Sarlanda Esperanto-Ligo, kaj Esperanto France-Est. Krome, dum la lasta tago okazis virtuala kunveno kun afrikaj esperantistoj el Benino, Senegalio, Malagasio kaj Demokratia Respubliko Kongo, kiuj prezentis siajn projektojn kaj realojn – ofte sen modernaj rimedoj, sed kun granda sindediĉo.

En la interkona vespero eblis konatiĝi kun la partoprenantoj, kiuj volonte prezentis pliajn eventojn por la venontaj monatoj.

En la sabata mateno Bernard Vivier gvidis grupon en la koridoroj de la plej impona fortikaĵo Hackenberg sur la linio Maginot, kiu estis defendo-sistemo konstruita fare de Francio de 1928 ĝis 1940 laŭlonge de la limoj kun Belgio, Luksemburgio, Germanio, Svislando kaj Italio.

En la dimanĉa posttagmezo Catherine Kremer gvidis grupon tra la urbo Metz kaj en ties katedralo.

Tagmeze kaj posttagmeze disvolviĝis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, paralele kun prelegoj pri scienco, kulturo kaj sociaj aferoj.

Elstaris:

Pierre Grollemund, kiu detale parolis pri la rekonstruado de la katedralo Nia Damo de Parizo, kun fakaj rimarkoj pri uzataj materialoj kiel ligno kaj plumbo.

Patrick Lagrange, prezentinta la mirindaĵojn de la spaca teleskopoj (JWST), kiu povas sendi fotojn de la spaco, multe pli densaj ol surteraj teleskopoj. Li prezentis ankaŭ la tre aktulan temon "Kio pri klimatsanĝo?"

Ursula Niesert, pri la funkciado de la propagando-sistemo.

Werner Faber, traktanta la situacion en Kipro, aparte la turka parto.

Pablo-Andrés Domenech, juna esperantisto, raportis entuziasme pri la lastatempa Hispana Esperanto-Kongreso.

Daniel Raoult, parolis pri plantoj Arumo (Arum maculacum), kiu forglutas insektojn.

Catherine Kremer, prezentis la regionon Loreno.

Bettina Naroska iniciatis kelkajn ĉeestantojn je korpo-perkutado kaj sanigaj kantoj.

Elisabeth Barbay, prezentis pedagogian valizeton por infanoj.

Marielle Giraud, historiistino, rakontis pri J. Morris, esperantisto, anarkiisto kaj laŭnaturisto, pioniro de ekologio kaj de malkreskado.

Kaj speciale kortuŝis la raporto de Pierre Grollemund pri akvoprovizaj projektoj en Kalima kaj Kakutya (DR Kongo), kiuj montras efikan kunlaboradon inter lokaj loĝantoj kaj eksterlandaj subtenantoj (agado de Asocio de Verdulaj Esperantistoj).

Du progresantoj kuraĝe partoprenis la unuagradan nivelon kaj sukcesis.

La vesperoj estis rezervitaj por muzikaj ĝuadoj. La altnivela vira koruso "La Voĉoj de l' Oriento" (Les Voix de l'Est) lerte prezentis kantojn en pli ol dek lingvoj, inkluzive



de “Bella Ciao” en Esperanto. La Revolucia Koruso (La Chorale Révolutionnaire), konsistanta ĉefe el junuloj, entuziasme prezentis kantojn en diversaj lingvoj kun sociaj mesaĝoj, inter ili estis la klasika “La Internacio” en Esperanto. Estis emociaj momentoj. Notinde ke ili antaŭe neniam lernis nian lingvon sed trejniĝis kun iom da helpo kaj perfekte kantis Esperante. Post la kantado la korusoj bone interŝanĝis kun la esperanta publiko en frateca etoso.

La kongreso estis ankaŭ okazo por asocia laborado. Dum la laborsesioj de SAT-Amikaro, oni diskutis financajn defiojn (ekzemple, rilate al la sidejo en Parizo) kaj planis estontajn agadkampojn. Jean-Luc Thibias, reprezentanto de la libroservo de EFE, prezentis la plej freŝajn eldonaĵojn kaj informojn. SAT-Amikaro prezentis librojn kaj eldonaĵojn de SAT.

Okazis ankaŭ la Ĝenerala Membro-Kunveno de EFE, dum kiu oni resumis la agadon de la pasinta jaro kaj diskutis pri la estonteco de la federacio.

Kvankam kelkaj atentigis pri manĝokvanto kaj ĉambrokomforto, la ĝenerala impresado estis tre pozitiva. La kunfandiĝo de instruado, kulturo, interŝanĝo kaj amikeco en tia paca loko lasis fortan memoron al ĉiuj ĉeestintoj.

La tuta aranĝo ne estus ebla sen la klopodoj de Bruno Henry kaj asocioj el Esperanto-Thionville, al kiuj multaj partoprenantoj esprimis sian sinceran dankon kaj okaze de la glaso de l’ amikeco. La sukceso de la kongreso en Vigy nutras la esperon pri daŭra vigleco de la Esperanto-movado en la regiono kaj tutmonde.

Oni prezentis kaj parolis pri du eventoj: La 98a SAT-Kongreso en Greziljono, en Baugé-en-Anjou, de la 9a ĝis 16a de aŭgusto 2025 kaj la 74a Kultura Semajnfino en Homburgo de la 4a ĝis la 6a de julio 2025. Tie refoje kunfluos esperantistoj por diskuti, lerni, kanti – kaj simple esti kune.

Bruno Henry

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Grava renkontiĝo en la Litovia parlamento



La 15an de majo 2025 en la Litovia parlament-ejo (Sejmo) en Vilno la unua vicprezidanto de la parlamento Juozas Olekas akceptis la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio (LEA) Povilas Jegorovas. Estis pridiskutitaj diversaj aspektoj de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj kiuj okazos en Kaŭno ekde la 5a ĝis la 13a de julio.

Kiel estis anoncita pli frue (vd. p 47), Juozas Olekas konsentis esti Alta Protektanto de BET-59. Li partoprenos la solenan inaŭguron en Kaŭno la 6an de julio. Krome, la Litovia vicparlamentestro sendos specialan mesaĝon al la partoprenantoj de BET-59, publikigotan en “Libro por BET-ano” kaj en “Kunfluo”, la ĉiutaga gazeto de BET-59. Li helpos ankaŭ en la financado de BET pere de la ministerio pri edukado, scienco kaj sporto.

Kiel estas sciata, pasintjare ekestis la ideo organizi en 2028 la 113an Universalan Kongreson de Esperanto en Kaŭno. En 2005 la 90a UK okazis en Vilno. Laŭ neskribita regulo post 20 jaroj denove eblas organizi UKon en la sama lando. Do, temas pri UK en Kaŭno – la ĉefurbo de la Esperanto-movado en Litovio. Sed organizi UKon estas tre respondeca kaj serioza tasko. Tial antaŭ ol proponi al Estraro de UEA denove organizi UKon en Litovio, necesas anticipe certigi pri politika kaj financa subteno de la Litovia ŝtato, same kiel estis en 2005.

Pro tio kun la unua vicprezidanto de Litovia parlamento Juozas Olekas jam nun estis priparolitaj diversaj demandoj de la okazigo de la 113a UK en Kaŭno en 2028. Temis pri ŝtata helpo, Alta Protektanto de la kongreso, invito de gvidantoj de UEA al Litovio fine de 2025 aŭ komence de 2026 kaj kelkaj aliaj aferoj.

Krome estis diskutita la stato de la Esperanto-movado en Litovio kaj en la mondo.

Povilas Jegorovas

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Tiuj el niaj legantoj, kiuj partoprenos en la 59a BET en Kaŭno, havos la ŝancon viziti la Nacian artmuzeon de Mikalojus Konstantinas Čiurlionis, kiu situas tre proksime de la BETejo. (Foto: Justė Mocevičiūtė)

De sukcennoj ĝis steloj: La jaro de Ĉiurlionis

La jubilean jaron de Mikalojus Konstantinas Ĉiurlionis, naskiĝinta antaŭ 150 jaroj festos ne nur Litovio, sed la tuta mondo – diversaj jubileaj aranĝoj ondumos tra pluraj landoj de la mondo: de Suda Afriko ĝis Svedio, de Suda Koreio ĝis Hispanio. Tamen la plej granda krea heredaĵo de Ĉiurlionis estas gardata en la Nacia artmuzeo de Ĉiurlionis, kiun okaze de la jubileo de la artisto oni kolorigis per la internacia ekspozicio: “De sukcennoj ĝis steloj: samtempuloj kaj samideanoj de M. K. Ĉiurlionis”.

M. K. Ĉiurlionis estis komponisto kaj artisto, kiu elprovis sin en literaturo kaj fotado; dum la mallonga sepjara periodo de kreado li kreis pli ol 300 pentraĵojn, pli ol 700 grafikaĵojn kaj skizojn, ĉirkaŭ 400 muzikajn verkojn, kiuj preskaŭ ĉiuj estas gardataj en la Nacia artmuzeo de M. K. Ĉiurlionis.

En la pentraĵoj de Ĉiurlionis estas rimarkebla tre klara siaspeca percepto de spaco, prezentanta impreson, kvazaŭ ĝi estis pentrita de birda flugo. Al pentraĵoj oni donas kromkoloron de kosma vido, profunda interna koncentriĝo. La artiston interesis demandoj pri la ekapero de la Universo, ĝia strukturo, spirito reganta la mondon, naturo kaj ĝiaj cikloj, esenco de la homa vivo, evoluo de psika stato kaj estado, eblo realigi principojn de muzika kreado en pentrado.

Muziko plenigis la vivon de Ĉiurlionis per plej diversaj formoj. Li aktive kreis eksterordinarajn verkojn, harmoniigis popolajn kantojn, gvidis korusojn, koncertis, verkis artikolojn.

Liaj grafikaj verkoj kaj skizoj helpas pli profunde kompreni lian pensofluan kaj motivojn, kiuj vekis liajn fluojn. Liaj inaj komponaĵoj elstaras pro virtuoza, preskaŭ juvelarta tekniko, riĉeco de strekoj kaj detalaj ornamaĵoj.

Ĉiurlionis estis scivolema kreanto, interesita ne nur pri filozofio, teozofio, kosmologio, diversaj religioj kaj mitoj, sed ankaŭ pri novaj sciencaj kaj teknikaj eltrovoj. Do, ne estas surprize, ke fotilo troviĝis en liaj manoj. Sur liaj fotoj estas kaptitaj momentoj de la somero 1905 pasigita en Kaŭkazo.

La jaro de Ĉiurlionis: de la marprofundoj ĝis la kosma infinito

En la Nacia artmuzeo de Ĉiurlionis estas prezentata internacia ekspozicio “De sukceso ĝis steloj: M. K. Ĉiurlionis, samtempuloj kaj samideanoj”, dediĉita al la 150a datreveno de la plej fama litova komponisto kaj pentristo Mikalojus Konstantinas Ĉiurlionis. Ĝi ebligas novmaniere rigardi la verkaron de la artisto kaj la rilaton inter liaj plej ŝatataj temoj – la maro kaj la kosmo. En la ekspozicio estas prezentataj verkoj de Ĉiurlionis, liaj samtempuloj kaj nuntempaj artistoj, por kiuj gravas tiuj du temoj, malkaŝantaj la interrilaton inter arto kaj scienco. La verkoj alvenis el la plej famaj eŭropaj muzeoj: Tate Galerio, Brita Muzeo, Musée d'Orsay, Centro Pompidou, Muzeo de Wenzel Hablik kaj aliaj. Vizitantoj vidos pli ol 100 artverkojn, instalaĵojn kaj objektojn. La ekspozicio montras la profundon kaj novigan spiriton de Ĉiurlionis: de la marprofundoj ĝis la kosma senlimo.



De sukcennoj al steloj (Foto: Justė Mocevičiūtė)

En la ekspozicio estas prezentataj ne nur la ĉefverkoj de Čiurlionis, inkluzive de ĝis nun neekspoziciitaj verkoj, sed ankaŭ verkoj de samtempuloj kaj nuntempaj artistoj. Ĝi traktas la signifon de scienco, kiu influis multajn verkojn tiutempe kaj nun. Kelkaj artistoj, inspiritaj de Čiurlionis, kreis verkojn speciale por ĉi tiu ekspozicio. Tio refoje konfirmas, ke liaj ideoj restas aktualaj, liaj temoj estas universalaj, sentempecaj kaj daŭre inspiraj por nuntempaj kreintoj. La ekspozicio funkcios ĝis la 12a de oktobro 2025.

La sola loko en la mondo, kie troviĝas la tuta krea heredaĵo de Čiurlionis

La Nacia artmuzeo de M. K. Čiurlionis, fondita en 1921, estas unu el la plej gravaj kulturaj institucioj de Litovio, dediĉita al konservado kaj diskonigo de la nacia arta heredaĵo. Ĝi estas unu el la plej impresaj ekzemploj de modernisma arkitekturo kaj en 2023 estis registrita en la listo de Monda Heredaĵo de Unesko. La muzeo situanta en Kaŭno enhavas ampleksan kolekton reprezentantan la historion de la litova kaj monda arto ekde antikveco ĝis nuntempo.

Ĉi tiu muzeo estas la sola loko en la mondo kie estas konservata preskaŭ la tuta krea heredaĵo de M. K. Čiurlionis – la plej fama litova pentristo, komponisto, verkisto

kaj publika aganto: pentraĵoj, muzikaj komponaĵoj, grafikaj verkoj kaj persona arki-vo. En la renovigita ekspozicio de 2025 oni prezentos ne nur liajn pentraĵojn, sed ankaŭ lian multflankan kreadon: muzikon, grafikaĵojn kaj fotoĵojn. La verkoj estas montrataj en nova, moderna lumo, apud la verkoj de famaj italaj geniuloj.

La muzeo prezentas preskaŭ 600 jarojn da malnova arto, reflektante la tendencojn de la litova arto kaj kulturo. En la ekspozicio “Litova arto de la 14a ĝis la 19a jarcentoj” vizitantoj malkovros mezepokajn trezorojn, legendojn, rarajn verkojn, morton, eklezion kaj la mondon de la riĉuloj... En la interna korto de la muzeo vi povas viziti la unikan ekspozicion “Litovio de Krucoj” pri la litova tradicio de krucofarado. La ekspozicio “Arĥaiteco: litova popolararto de la 18a ĝis la 20a jarcentoj” prezentas la plej malnovajn aŭ neŝanĝiĝintajn formojn de la popola kulturo, neinfluitaj de urbaj aŭ industriaj efikoj.

La muzeo estas dinamika spaco de artaj dialogoj, kun ekspozicioj, esploroj kaj edukaj programoj, fleganta la ligojn inter la kultura pasinteco de Litovio kaj la tutmonda arto. Zorgante pri la nacia kaj internacia kultura heredaĵo, la muzeo estas grava. Vizitu la muzeon dum BET-59.

Pli da informoj estas ĉe <https://ciurlionis.lt/>

Vida Labanauskienė

Tradukis el la litova **Aida Čižikaitė** kaj **Gražina Opulskienė**



La ekspozicio “Arĥaiteco”

Esperanto-Plaĝo 2025:

Kio, Kia kaj Kial

En ĉi tiu artikolo mi ŝatus resumi tion, kio okazis dum la kvara Esperanto-Plaĝo de Hispanio, en kiu ĉi-jare partoprenis lernantoj kaj gastoj el Hispanio, Francio, Nederlando, Italio, Belgio kaj Anglio. Sed pli ol tio, mi volas iom pli profunde skizi, kia estas la ĝenerala enhavo kaj strukturo de tiu dumonata kursaro, kaj kio motivis min krei kursaron tiom longan kaj tiom intensan, kurson kiu enhave sekvis miajn unuajn eksperimentojn en la Liceo de Esperanto en Madrido (1987, 1988), kaj ĉe la Kastelo Greziljon (1988). La unumonataj ĉinaj Esperanto-Insuloj inter 2010 kaj 2013, kiuj similis la nunajn hispanajn versiojn, estis abunde priskribitaj en antaŭaj artikoloj en “Esperanto”, “Internacia Pedagogia Revuo” kaj “La Ondo de Esperanto”.

Ek al la kio, la kia, kaj la kial de Esperanto-Plaĝo!

Longdaŭraj, tre intensaj kursoj. Dum la lastaj jardekoj, per la helpo de la BEK-Kurso, mi provis instrui Esperanton en la kadro de tre intensaj studo-staĝoj kun daŭroj de inter 30 kaj 60 tagoj. Ĉiuj kvar ĉinaj “Esperanto-Insuloj” daŭris 30 tagojn, dum ĉiuj kvar hispanaj “Esperanto-Plaĝoj” daŭris duoble pli. La lasta Esperanto-Plaĝo komenciĝis la 1an de aprilo ĉi-jare, kaj finiĝis la 31an de majo kun ĉirkaŭ 280 instruado-horoj: 200 en aprilo kaj 80 en majo. Ĝi okazis en la marborda, turisma urbeto Cullera, proksime de Valencio. Ĉeestis kvar plentempaj lernantoj (François, Rianna, Chus kaj Ronaldo), kaj kvin gastoj (Damiano, Philippe, Santiago, Raia kaj Alex, kiuj spertis la lernadon dum certa tempo, kaj kiuj partoprenis ankaŭ en la kafo-kunvenoj, kunmanĝoj kaj ekskursoj. Aldone al tiuj naŭ partoprenantoj, venis esperantistoj el la regiono Valencio (Luis, Elias, kaj Carmen de Valencio; Pau de Alcira, Santiago de Cullera, Francisco de Castellon, kaj Ivan de Xeraco), kiuj de tempo al tempo kunveturis kun ni por diversaj etvojaĝoj, pri kiuj mi parolos poste.

Kompare kun KER. La ekstreme intensa unua monato de la instruado fokus-iĝis sur la baza gramatiko kaj vortstoko de la lingvo. Se iu volas ekvivalenton en la KER-sistemo, ni diru, ke la plaĝo-kurso, komenciĝas je la nulo-nivelo, kaj rapide disvolviĝas tra A1, A2, B1 kaj B2. Tamen la enhavo de la kurso ne plene kongruas kun la eŭropa ekzameno: kelkaj partoj de Esperanto-Plaĝo superas ĝin, aliaj mal-superas. La lerno-rezultoj tra la jardekoj estas tre variaj pro aĝo-diferencoj, motivoj, denaskaj lingvoj kaj lerno-limigoj, ekzemple disleksio (vortblindeco), aŭdo-malfacilaĵoj, sinteno je lingvo-lernado, ktp. Simplaj konkludoj ne eblas pro la abundo de lingvaj faktoroj.

Kompare kun vort-frekvence limigitaj kursoj. La lernado de novaj vortoj en la aprila parto de Esperanto-Plaĝo estas, kune kun gramatika akirado, tre grava parto de la lecionoj. Kontraŭe al multaj modernaj kursoj, BEK neniel provas limigi ekzercojn nur al la plej oftaj 500 vortoj. Ĝis nun mi ne zorge kalkulis kiom da vortoj, morfemoj estas uzataj en BEK, sed la kvanto certe preterpasas tri mil. Tiujn milojn da vortoj mi elektis dum kvar jardekoj da eksperimentado kun longdaŭraj kursoj en Eŭropo kaj en Azio. Ĉi-jare pro tio, ke ĉiuj partoprenantoj devenas de Eŭropo, ilia lernado de 2000, 3000 novaj vortoj ne tro malfacilis. Tamen en antaŭaj jaroj de miaj intensaj kursoj, la kvanto da novaj vortoj en leciono estis granda defio por certaj azianoj eĉ se ili havas ĉe-mane dulingvan vortaron. Aliflanke, al azianoj kiuj profunde studis unu eŭropan lingvon kiel la anglan, francan aŭ germanan, la tasko estas relative facila. Sed por ĉinoj, koreoj aŭ japanoj, 3000 vortoj alproprigitaj en unu monato povas esti terure malfacila lerno-tasko se ili ne studis eŭropan lingvon antaŭe.

La BEK-materialo. BEK-1, simplaj frazoj. Por pli bone kompreni la enhavon de la unua monato de Esperanto-Plaĝo, en kiu lernantoj ĉeestas lecionojn kvar horojn matene kaj kvar horojn posttagmeze, indas ekkoni la BEK-Kurson, sen kies materialo, ne eblus al mi instrui dum tiom da horoj ĉiutage. La laŭŝtupa, zorge verkita, kohera ekzercaro de BEK, la Baza Esperanto-Kursaro, konsistas el kvar ĉefaj partoj: BEK-1, BEK-2, BEK-3 kaj BEK-4. La unua nivelo, BEK-1, enhavas plejparte simplajn frazojn. Ekzemple: “Ĉu Parizo estas la ĉefurbo de Francio?” Aŭ “Ĉu vi kutime vekiĝas antaŭ aŭ post la sepa matene?” En tiu uzado de simplaj frazoj, ĝi similas la Cseh-kurson, sed BEK ampleksas multe pli da gramatikaĵoj kaj multoble pli da lernendaj vortoj. Krome, en BEK, kontraŭe al la Cseh-metodo kaj al Duolingo, plejparte mankas ripetado; preskaŭ ĉiuj frazoj en BEK estas unikaj, kio prezentas pli malfacilan, sed atingeblan lerno-taskon. La inspiro por BEK-1 devenas ĉefe de mia laboro kiel profesia instruisto ĉe la lingvolernejo Berlitz, en Madrido en la fruaj 1980-aj jaroj. Berlitz estis la unua kiu kreis lingvolernejojn en la 19a jarcento, kie la ununura metodo estis la Rekta Metodo. La Cseh-metodo, kaj aliaj similaj rektaj metodoj sekvis la vojon de Berlitz.

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Pasintjare estis solenitaj la 300a naskiĝdatreveno kaj la 220a mortodatreveno de Kantio (Immanuel Kant, 1724-1804), la plej konata el ĉiuj loĝantoj kaj loĝintoj de Kenigsbergo-Kaliningrado. Kaj ĉi-jare ni proponas al vi konatiĝi kun ĉefaj tezoj de lia traktaĵo “Al Eterna Paco” – bedaŭrinde, la temo de paco estas nun akre aktuala en pluraj lokoj de nia mondo.

Jubileoj kaj memordatoj en julio 2025

1. Antaŭ 20 jaroj mortis **Fernando de Diego de la Rosa** (1919-1933-2005), hispana tradukisto, redaktoro kaj esperantisto, loĝinta en Venezuelo kaj Pollando; unu el la plej elstaraj Esperanto-tradukistoj (*"Cigana romancaro"* de F. García Lorca, 1971; *"La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha"* de M. Cervantes, 1977; *"Boule de suif"* de G. Maupassant, 1982; *"D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde"* de R. Stevenson, 1985; *"La familio de Pascual Duarte"* de C. J. Cela, 1985; *"Sentempa simfonio: Poem-antologio hispana"*, 1987; *"Norda odiseado kaj aliaj rakontoj"* de J. London, 1988; *"Drolaj rakontoj"* de H. Balzac, 1989; *"Cent jaroj da soleco"* de G. García Márquez, 1992; *"La oldulo kaj la maro"* de E. Hemingway, 1996 k. a.); aŭtoro de *"Pri Esperanta tradukarto"* (1979), *"Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas"* (1982), *"Pri literatura kritiko"* (1984), *"Gran Diccionario Español-Esperanto"* (2003). Kunaŭtoro de *Literatura Manifesto '87*; laŭreato de la OSIEK-premio (1997, pro la traduko de *"Cent jaroj da soleco"*), honora membro de UEA (1993).

- Legu pli en la enciklopedio *"Nia Diligenta Kolegaro"* (p. 70-72).

3. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Nicolina Gabrielli** (1920-1955-2016), itala ĵurnalisto, verkistino, eldonistino kaj esperantistino konata en Esperanto kiel Lina Gabrielli kaj Lina Trenner Gabrielli; aŭtorino de sep beletraj libroj en Esperanto: *"La kombilo"* (1962), *"Bill kaj Lazuraj Okuloj: aŭ du kuleretoj da ĉielo"* (Kun A. Galdoni, 1964), *"Karnavalo"* (1973), *"Ni devas vivi"* (Kun K. Walraamoen, 1974), *"La ĝardeno de la urbestro"* (1978), *"Vivendo"* (1979), *"Nuancoj"* (Kun K. Szczurek, 1980) kaj de kvin tradukoj. Ŝi eldonis, plejparte kun la eldonmarko Plejado, kvardekon da libroj, inter kiuj, krom ŝiaj propraj verkoj, estis la kvarvoluma preskaŭ milpaĝa antologio *"Tra la parko de la franca poezio"*, kiun kompilis, tradukis kaj komentis G. Waringhien; honora membro de UEA (2001).

- Legu pli en la enciklopedio *"Nia Diligenta Kolegaro"* (p. 99-100).

3. Antaŭ 15 jaroj mortis **Umesao Tadao** (1920-1945?-2010), japana kultura antropologo, iniciatinto kaj direktoro de la Japana Nacia Muzeo de Etnologio, kaj esperantisto, Esperanto-instruisto, aŭtoro de *"La spirito de Esperanto"* (1983), *"Sepdek sep ŝlosiloj por la japana civilizacio"* (1987) kaj de la japanlingva esearo *"Miaj travivaĵoj en Esperantujo"* (1994), kuntradukinto de *"Vivo de Zamenhof"* de E. Privat en la japanan (1965); membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

11. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Vilmos Benczik** (1945-1959-2021), hungara instruisto, literaturisto, tradukisto, eldonisto kaj esperantisto; redaktoro de "Hungara Vivo" (1976-90), direktoro de la libroeldonejo de HEA en kiu sub lia direktado aperis 138 Esperanto-libroj; kompilinto kaj redaktinto de pluraj kolektivaj verkoj, i.a.: "25 jaroj: Antologio de belartaj konkursoj" (kun W. Auld, 1977), "Baza Literatura Krestomatio" (1979), "Hungara antologio" (1983), "Baza legolibro por komencantoj" (1986), "Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton" (1999), aŭtoro de pluraj artikoloj, recenzoj, antaŭ- kaj postparoloj (kelkaj el ili aperis en lia esearo "Studoj pri la Esperanta literaturo", 1980), tradukanto; prezidanto de HEA (1990-92), komitatano de UEA (1980-86), prezidanto de la juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj de UEA (1986-2002), membro de la Akademio de Esperanto (2001-21); honora membro de UEA (2016).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro" (p. 32-34) kaj en la intervjuo ĉe <https://sezonoj.ru/2020/07/benczik-4/>.

14. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Gianfranco Molle** (1950-1975-2018), itala muzikinstruisto, kanzonisto kaj esperantisto, kies kantoj, gitare akompanitaj de li mem, estas registritaj en ses liaj albumoj: "La vojo" (1976), "Horo da opozicio" (1978), "Kontakto" (1979), "La Poezio de la Patrolo" (1980), "Baf!" (1985), "La Fiŝkaptisto" (2007), en kelkaj kolektoj kaj en "Esperanta Songazeto".

15. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Jouko Lindstedt** (1955-1969-), finna lingvisto kaj esperantisto; aŭtoro de pluraj artikoloj kaj recenzoj aperintaj en libroj kaj gazetoj, kunaŭtoro kaj redaktoro de la "Hejma vortaro" (1999), redaktoro de "Planlingvistiko" (1981-83); prezidanto de la estraro de la Fondumo Esperanto (2001-), membro de la Akademio de Esperanto (1998-2025); kunverkinto de la Manifesto de Raŭmo (1980); laŭreato de la titolo "La Esperantisto de la Jaro 2000" (kun H. Bakker kaj M. La Torre); patro de tri denaskaj esperantistoj.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro" (p. 179-180).

16. Antaŭ 165 jaroj naskiĝis **Félicien Menu de Ménil** (1860-1901-1930), franca diplomato, komponisto kaj esperantisto; aktiva propagandisto de Esperanto kaj aŭtoro de pluraj artikoloj, redaktoro de "La Revuo" (1906-14) kaj "Franca Esperantisto" (1908-12), aŭtoro de "Les préjugés contre l'Espéranto" (1908) kaj "Muzika Terminaro" (1908), komponinto de muziko por pluraj Esperanto-kantoj, i.a., por la Zamenhofa poemo "La Espero", kiu iĝis la himno de Esperanto; membro de la Lingva Komitato (1914-30).

25. Antaŭ 50 jaroj (1975) en Kopenhago komenciĝis la **60a Universala Kongreso de Esperanto**, la unua UK post la “Hamburga Puĉo” en 1974.

25. Antaŭ 25 jaroj (2000) en Tel-Avivo komenciĝis la **85a Universala Kongreso de Esperanto**, la unua UK en Israelo.

26. Antaŭ 138 jaroj (1887) en la presejo de Ĥaim Kelter aperis la “**Unua Libro**” de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof – la naskiĝdato de Esperanto.

• Legu pli en la artikolo “La unua libro” de Aleksander Korĵenkov ĉe <https://sezonoj.ru/2020/07/unua>.

27. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Tazio Carlevaro** (1945-1957-), svisa kuracisto, psikiatro, psikoterapiisto, interlingvisto, idisto, esperantisto kaj konanto de pliaj planlingvoj; prezidanto de la kooperativo de Literatura Foiro (1980-85), kunaŭtoro de “Esperanto en perspektivo” (1974), aŭtoro de “Eseo pri Ido” (1976), “Esperanto aŭ Interlingua?” (1977), “Sociopsikologio kaj grupodinamiko de la Esperanto-movado” (1977), “Che cos’è l’Esperanto” (1985), “Per costruire una lingua. Manuale d’interlinguistica” (1993), “Bibliografio di Ido” (kun R. Haupenthal, 1999), Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045? (1999) k. a.; honora membro de SES (2019).

31. Antaŭ 30 jaroj (1995) en Serovo apud Sankt-Peterburgo komenciĝis la **51a Internacia Junulara Kongreso de TEJO**, la unua IJK en Ruslando kaj eksSovetunio.

Aleksander Korĵenkov



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>

Paco por popolo de diabloj

Jam pasis la unua kvarono de la 21a jarcento. Mi foje memoras, kiel esperplenaj ni estis je ĝia komenco. Malfermante ajnan gazeton hodiaŭ, ni povas konstati, ke dise sur la tergloblo estas fajroj, kaj ankaŭ kiel aŭtokratoj ŝatas ludi kun fajro. Laste mortas la espero (sed ankaŭ ĝi iam mortas). Antaŭ kompleta malesperigo indas legi etan broŝuron, kiu aperis antaŭ 230 jaroj en la tiama Pruslanda urbo Königsberg (la nuna Kaliningrado en Ruslando). Ĝia aŭtoro estis Immanuel Kant (1724-1804). Iu diris, ke la tuta filozofio konsistas el piednotoj al Platono kaj Kant, do certe indas konsideri, kion li diris pri paco kaj la kondiĉoj por la realigo de daŭra paco. Mi invitas tial vin legi kun mi lian filozofan traktaĵon “Al Eterna Paco”, kiu aperis en 1795.



En ĉi tiu teksto mi citas *kursive* la tradukon de Paul Christaller, kiu unue aperis en 1924 ĉe “La Batalanto” kaj estis trifoje reeldonita de “Fonto” (laste en 2019). Tiu eldono ne estas sen problemoj, sed ĝi meritas pli vastan legantaron.

La paco de tombejo?

Kant komencas sian traktaĵon per “savklaŭzo”, en kiu li priskribas satiran emblemŝildon de iu nederlanda gastejo, sur kiu videblas tombejo. Nuntempe ni rapidpaŝe marŝas al tiu paco. Sed ĉu la homaro, uzante sian racion povus realigi pacon, aŭ ĉu tio restas *dolĉa revo*?

Kant verkis sian traktaĵon kiel packontrakton. En la komenco estas la provizoraj artikoloj kaj fine aldonoj, poste definitivaj artikoloj kaj fine aldonoj kaj kromaĵoj.

La provizoraj artikoloj priskribas, kion la ŝtatoj devus apliki tuj kiel nepran antaŭkondiĉon.

Provizoraj artikoloj pri daŭra paco inter la ŝtatoj

1. *Neniu pac-kontrakto estu valida, en kiu oni sekrete rezervis eblecon por estonta milito.*

Vera paco ne estu armistico, sed ĉeso de ĉiaj malamikaj agoj. Kondiĉo por daŭra paco estas, ke ĉiuj imageblaj kialoj por estonta milito estas forigitaj. Sekve paco enkondukas novan fazon de historio inter ŝtatoj sen malicaj intencoj.

2. *Oni ne permesu, ke iu ŝtato aligu al si ekzistantan ŝtaton (indiferente estas, ĉu tiu dua ŝtato estas malgranda aŭ granda) per heredo, ŝanĝo, aĉeto aŭ donaco.*

En pli frua skizo Kant ankaŭ mencias konkeron de sendependaj ŝtatoj.

3. *Oni ĉesigu iom post iom la ekziston de armeoj ĉiam-pretaj.*

Aliloke Kant eksplikas tre klare: tiu, kiu dungas homojn por mortigi aŭ esti mortigitaj, tiu uzas ilin kiel maŝinojn kaj ilojn kaj ne kiel memdecidantajn subjektojn en la ŝtato.

4. *Oni ne rajtu fari ŝtat-ŝuldojn rilate al ekster-aferoj de l'ŝtato.*

5. *Neniu ŝtato enmiksi sin perforte en la konstitucion kaj regadon de alia ŝtato.*

La suverenaj ŝtatanoj decidas mem pri siaj aferoj.


6. *Neniu ŝtato, militanta kontraŭ alia, permesu al si malamikaĵojn, kiuj nepre malebligas post paciĝo la reciprokan fidon, nome: dungo de murdistoj (percussores), venenigistoj (venefici), ignoro de kapitulacio, instigo al perfidado (perduellio) en la ŝtato malamika.*

Tiuj estas senhonoraj agoj. (Imagu pri kio militantaj ŝtatoj nuntempe devus rezigni, se ili aplikus tiun provizoran artikolon).

La provizoraj paragrafoj ankoraŭ ne garantias pacon, sed ja estas nepra kondiĉo por foresto de milito.

En la definitivaj artikoloj Kant koncize difinas, kiamaniere eterna paco povas esti establita. Estas unue la regado de la ŝtatoj, due la rilatoj inter la ŝtatoj kaj trie la rilatoj inter la individuoj kaj la ŝtatoj.

Definitivaj artikoloj pri daŭra paco inter la ŝtatoj



1. *La burĝa konstitucio en ĉiu ŝtato estu respublika.*

Kant distingas inter *la formoj de la ŝtato* (aŭtokratio, aristokratio kaj demokratio) kaj *la metodo pri regado* (respublika aŭ despota).

Certe estas surprize por nuntempaj legantoj, ke por Kant demokratio estas formo de despotismo, sed: *Respubliko estas la ŝtat-principo de l'disigo de la aga potenco (de la regado) for de la leĝdona potenco; despotismo estas la ŝtat-principo de l'propre-vola apliko de leĝoj, kiujn ĝi mem estis doninta de la propra volo.*

En "Metafiziko de etiko" (1797) Kant aldonas, ke la leĝo en respubliko estas memreganta kaj ne dependas de personoj.

Respubliko en la kompreno de Kant estas unuigo de homoj, kiuj ĉiuj akceptas

vivi kune kaj doni al si mem leĝojn. Tiel en la respubliko de Kant ĉiuj regas kaj ne unu persono, aŭ grupo da personoj, eĉ ne la plimulto. Ĉiuj regas sin mem.

Kaj plue en “Al Eterna Paco” rilate al milito:

La respublika konstitucio enhavas [...] la ŝancon [...] al daŭra paco. Kaj jen la tialo: Se [...] la konsento de l'civitanoj estas bezonata por la decido “ĉu milito necesas aŭ ne”, tiam nenio estas pli natura ol ke ili treege hezitos, komenci tian malbonan aferon, ĉar ili ja devus decidi, ke ili propra-vole akceptas la suferojn de milito (nome: mem batali, el sia havo pagi la kostojn de la milito, mizere ripari la detruojn faritajn; fine, por abundigi la malbonon, akcepti mon-ŝuldegon, kiu maldolĉigos eĉ la pacan tempon kaj neniam estos amortizebla pro proksimaj denovaj militoj.

2. La juro inter popoloj estu bazita sur konfederado de liberaj ŝtatoj.

Kant kialigas: Oni povas pruvi la efektivigeblon (objektivan realecon) de tiu ideo de federeco, kiu sin etendu iom post iom super ĉiuj ŝtatoj, kaj tiele kondukos al daŭra paco. Ĉar kiam aperas la bonŝanco, ke potenca kaj klarvida popolo fariĝas respubliko (kiu laŭnature devas inklini al paco), tiam ĉi tiu fariĝos centro de la federa unuiĝo pro aliaj ŝtatoj, kiuj al ĝi aliĝos kaj tiele certigas la liberecon de ŝtatoj, laŭ la ideo de justo inter popoloj, kaj per pluraj tiaj interligoj la federacio ĉiam pli ampleksiĝos.

Kant do ne proponas unu tutmondan registaron, sed ligo de pacamantaj respublikoj. Li agnoskas, ke homoj estas diversaj laŭ lingvo kaj religio kaj li ne celas abolicii tiajn diferencojn.

3. La universala civitaneco (kosmopolita rajto) estu limigata al kondiĉoj de ĝenerala gastebleco.

Kant plue klarigas: La gastebleco, [...] t. e. la rajto de alvenintaj fremduloj, konsistas en tio (kaj en nenio plua), ke ili havas la eblon provi interrilaton kun la enlandanoj. Tiumaniere disaj kontinentoj povas pace interrilatiĝi. La homaj gentoj vere rilatas en tiu maniero tio ĉiam pli akcelos starigon de kosmopolita konstitucio por la homa gento.

Estas rimarkinde, ke Kant akre kritikas la tiam jam burĝonantan imperialismon: [...] sub la preteksto starigi nurajn komercejojn [la komercantaj ŝtatoj] enloĝigis militistojn, per kiuj ili kaŭzis subpremon al la landanoj, [...] malsaton, ribelon, perfidon kaj kio plie estas sur la listo de l' malbonoj premantaj la homaron.

Post tiuj klaraj vortoj estas du aldonoj al la packontrakto.

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de La Ondo de Esperanto legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Dum 2022-2024 aperis 12 el la 16 partoj de nia projekto “Rusa Novelaro 2”, kiu ĉi-jare kompletiĝos per aperigo de verkoj de kvar pliaj rusaj verkistoj. La dua el ili, kaj la dek-kvara en la serio, estas Konstantin Paustovskij (1892-1968), kies kvin rakontojn vi povas legi en la sekvaj paĝoj.

Konstantin Paustovskij, honesta inteligenciano en la lando de sovetoj

En la 1964a jaro Marlene Dietrich venis al Moskvo, kaj jam en la flughaveno ŝi diris, ke ŝi volas renkontiĝi kun rusa verkisto, kies rakonto draste impresis ŝin, sed ĉagrenis ŝin tio, ke ĉi tiu verkisto grave malsanas kaj estas en hospitalo. Ŝia programo enhavis prezenton en la Centra domo de literaturistoj, kaj tie oni informis ŝin, ke la verkisto probable estas en la salono. Kiam ŝi finis sian rakontadon la maljuna verkisto venis sur la scenejon, kaj, ne sciante la rusan lingvon, ŝi, por esprimi sian admiron, surgenuiĝis antaŭ li, balbutante dankvortojn (ial germane, sed ne angle), kiuj dronis en la ŝtormo de aplaŭdoj.

Ĉi tiu verkisto estis Konstantin Paustovskij.

Konstantin Georgijeviĉ Paustovskij (Паустовский) naskiĝis la 19an (Gregorie: la 31an) de majo 1892 en Moskvo, en la familio de la eksarmeano kaj fervojisto Georgij Paustovskij (filo de ukraina kozako kaj turkino, kiun la kozako ekamis en Turkia militkaptitejo) kaj Maria Vysoĉanskaja el poldevena romkatolika familio. En 1898 la familio ekloĝis en Kievo, kie Konstanteno lernis en gimnazio (kun unujara paŭzo, kiam post la divorco de la gepatroj (1908) li loĝis ĉe sia onklo en Brjansk). En 1912 li studentiĝis en la Kieva universitato, sed pro la Unua Mondmilito li iris al Moskvo kaj ekstudis en la Moskva universitato, sed devis ĉesigi siajn studojn kaj laboris diverspostene en Moskvo kaj aliloke. Dum la interna milito, kiu sekvis la Unuan Mondmiliton, Paustovskij estis mobilizita al la armeo de Skoropadskij, poste al la ruĝa armeo. Postmilito li loĝis en Odeso, Krimeo kaj Kaŭkazo, kaj en 1923 revenis al Moskvo kaj laboris tie kiel ĵurnalisto, redaktoro kaj verkisto.

Paustovskij multe vojaĝis tra Ruslando, Sovetunio kaj Eŭropo, sed precipe li ŝatis la Meŝĉoran landon – vastan areon inter la riveroj Kljazjma (norde), Oka (sude) kaj Gusj (oriente) – kie li loĝis en la vilaĝo Solotĉa, kaj la urbeton Tarusa sur la bordo de Oka, kie li loĝis de 1955 ĝis sia morto en 1968.

Liaj unuaj rakontoj aperis en Kievaj gazetoj, kiam li lernis en la lasta gimnazia klaso, sed lia unua novelaro “La renkontitaj ŝipoj” aperis nur en 1928, kaj lia verkista talento estis ĝenerale rekonita kiam li estis jam 40-jara – en 1932 aperis lia romano “Kara Bogaz”. Sekvis pluraj romanoj, romanetoj, noveloj, porinfanaj rakontoj.

Post la Dua Mondmilito aperis ses apartaj libroj de lia membiografia romano “Rakonto pri la vivo”: “Jaroj malproksimaj” (1946), “La maltrankvila junaĝo” (1954), “La komenco de la nekonata jarcento” (1956), “La tempo de grandaj atendoj” (1958), “La impeto al la sudo” (1960) kaj “La libro de vagadoj” (1963).

Paustovskij estas malfacile imagebla kiel tipa sovetia verkisto. Ekzemple, li neniam menciis Stalinon en siaj verkoj, ne aktivis en la verkista unio, ne membris en KPSU, ne estis “Heroo de socialisma laboro”, nek ricevis literaturajn premiojn, eĉ ne tiun de Nobel (kvarfoja kandidato dum 1965-68), sed la verkoj de “Doktoro Paust” estis popularegaj – en 1963 en sociologia sondo pri “la plej legata vivanta aŭtoro” li okupis la unuan lokon, kun grandega distanco de Ŝoloĥov.

Fine de sia vivo Paustovskij, malnovtipa rusa inteligenciano, kiu antaŭe neniam aliĝis al piloriaj kampanjoj kontraŭ nelojalaj verkistoj dum la Stalina kaj Ĥruŝĉova epokoj, kelkfoje montris sian socian pozicion: en 1966 li subtenis la leteron al Breĵnev, subskribitan de 25 agantoj de kulturo kaj scienco kontraŭ la rehabilito de Stalin; en la sama jaro dum la proceso kontraŭ Andrej Sinjavskij kaj Julij Daniel li publike subtenis ilin; en 1967 li esprimis sian apogon al Solĵenicin, kiu direktis al la 4a kongreso de sovetiaj verkistoj peton likvidi la cenzuradon de beletraj verkoj.

Tamen demandoj politikaj kaj ideologiaj mankis en liaj verkoj, samkiel mankis en ili rimedoj eksperimentaj. Li verkis klasike, ĝisfunde uzante la riĉan elekton de la rusa lingvo, inteligente kaj kredinde pri ordinaruloj, kaj liajn verkojn legis ne snoboj, sed ordinaraj legantoj, serĉantaj ne la novismaĵojn, sed tion, kion ili serĉas en la literaturo – belon kaj bonon.

Ni revenu al “La telegramo”, kiun tiel alte taksis la Holivuda filmstelulino Dietrich. Ĝi en maniero kortuŝa prezentas du ŝajne kontraŭajn tendencojn. Unue, la disecon inter la homoj, due, ilian kunecon. Nastja disiĝis de la patrino kaj nur malofte skribas al ŝi, preferante sendadi al ŝi etajn monsumojn; kaj la patrino suferas pro ĉi tiu disiĝo. Sed samtempe Tiĥono, flanka homo kiu por konsoli ŝin ĉe ŝia mortohoro, verkis telegramon kaj legis ĝin, kvazaŭ mesaĝon de la filino al la mortanta patrino, ricevas de la maljunulino (kiu tuj komprenis lian intencon) ŝiajn lastajn dankvortojn. Kaj alia flanka homo, vilaĝa instruistino, kiu forlasis en urbo sian patrinon, “kiu estis same malgranda, ĉiam maltrankvila pro zorgoj pri sia filino kaj same tute grizhara”, iris en la funebra procesio kaj adiaŭe kisis la manon de la nekonata mortintino.

Sed ankaŭ Nastja suferas pro la disiĝo. Ne sukcesinte vidi la patrinon vivanta, ŝi pensas, ke “neniu krom Katerina Petrovna povus forpreni de ŝi la neripareblan kulpon, la neelporteblan pezaĵon”. Tamen ŝi ne povis veni ne pro sia malico aŭ ne-deziro vidi la patrinon – tute male, ŝi estas bonkora kaj helpema rilate al la homoj, inter kiuj ŝi vivas. Kaj tiun bonon, kiun ŝi povus fari por la patrino, ŝi faris al aliaj homoj, same kiel aliaj homoj faris al ŝia patrino tiun bonon, kiun ŝi ne faris.

Tiaj simplaj vivhistorioj multas en la verkoj de Paustovskij. Amo al proksimuloj kaj al la naturo, senprofita helpemo, strebo al simpla kaj honesta vivo, tre fora de la oficiala ideologio, atendas vin en la mirinda mondo de Konstantin Paustovskij.

La tradukintoj estos ĝojaj, se vi tralegos niajn tradukojn, sed ni eĉ pli ĝojos, se nia modesta laboro donos al vi ideon legi pliajn verkojn de Paustovskij en la rusa, aŭ tradukojn en viaj naciaj lingvoj.

Aleksander Korĵenkov

Konstantin Paustovskij

FLAVA LUMO

Mi vekigis dum griza mateno. Mian ĉambron plenigis egala flava lumo, kvazaŭ de kerosena lampo. La lumo venis desube, el la fenestro, kaj plej forte lumigis la traban plafonon.

Tiu stranga lumo – neforta kaj senmova – tute ne similis al la lumo suna. Lumis la aŭtunaj folioj. Dum la ventoplena kaj longa nokto la ĝardeno deĵetis sian sekan foliaron, kaj ĝi kuŝis kiel bruaj amasoj surtere kaj disvastigis senbrilan lumon. Pro ĉi tiu lumo homaj vizaĝoj ŝajnis sunbrunigitaj, kaj la paĝoj de la libroj sur la tablo kvazaŭ kovriĝis per vaksa tavolo.

Tiel komenciĝis la aŭtuno. Por mi ĝi venis tuj tiumatene. Antaŭe mi preskaŭ ne rimarkis ĝin: ankoraŭ mankis en la ĝardeno laodoro de putraj folioj, la akvo en la lagoj ne verdiĝis, kaj pika prujno ankoraŭ ne kuŝis dum matenoj sur la lignotabula tegmento.

La aŭtuno venis subite. Tiel venas sento de feliĉo pro plej nerimarkeblaj nuancoj – pro fora vaporŝipa sireno sur la rivero Oka¹ aŭ pro hazarda rideto.

La aŭtuno venis surprize kaj okupis la teron – ĝardenojn kaj riverojn, arbarojn kaj aeron, kampojn kaj birdojn. Dum unu momento ĉio iĝis aŭtuna.

En la ĝardeno tumultis paruoj. Iliaj krioj similis al tintoj de frakasita vitro. Ili pendis de branĉoj la kapon malsupren kaj enrigardis en la fenestron el sub aceraj folioj.

Ĉiumatene en nia ĝardeno, kiel sur insulo, kolektiĝis migrobirdoj. Pelmelo komenciĝis sur la branĉoj kun fajfoj, kriĉoj kaj grakoj. En la ĝardeno kviete estis nur dum tago: maltrankvilaj birdoj estis forflugintaj al la sudo.

Komenciĝis folifalo. La folioj falis tage kaj nokte. Jen ili oblikve flugis laŭ vento, jen vertikale kuŝiĝis al humidaj herboj. La arbaroj fluigis pluvon de falantaj folioj. La pluvo daŭris kelkajn semajnojn. Nur fine de septembro boskoj nudiĝis, kaj tra la densejo de la arboj ekvideblis la blua foro de la rikoltitaj grenkampoj.

Ĝuste tiam maljuna Proĥoro, fiŝisto kaj korbisto (preskaŭ ĉiuj maljunuloj en Sototĉa² ĉe la vivofino fariĝas korbistoj), rakontis al mi fabelon pri aŭtuno. Ĝis tiam mi nenie aŭdis la fabelon, – eble Proĥoro mem elpensis ĝin.

– Rigardu ĉirkaŭen, – Proĥoro diris al mi, pikante bastoŝuon per aleno, – atente rigardu, karulo, per kio spiras ĉiu birdo, aŭ alia vivanta estaĵo. Rigardu, klarigu. Aŭ oni diros: vi vane studis. Ekzemple, la folioj falas aŭtune, sed homoj eĉ ne supozas, ke la ĉefa kulpanto pro tio estas la homo. Aŭ jene: la homo inventis pulvon. La diablo disŝiru lin kune kun tiu pulvo! Ankaŭ mi okupiĝis pri pulvo por mia plezuro.

Dum malnova tempo vilaĝaj forĝistoj forĝis la unuan fusileton, metis pulvon en ĝin, kaj la pafilo trafis en la manojn de stultulo. La stultulo iris tra arbaro kaj rimarkis, ke oriojloj flugas en la ĉielo, la gajaj flavaj birdoj flugas kaj kune kantas fajfe, vokas gastojn. La stultulo pafis ilin ambaŭtube – kaj ora lanugo ekflugis al la tero, falis sur la arbarojn, kaj tiuj arbaroj flaviĝis, velkis kaj tuj senfoliiĝis. Kaj la aliaj folioj, al kiuj gutis la birda sango, ruĝiĝis kaj same falis al la tero. Verŝajne vi vidis en arbaro flavajn foliojn same, kiel la ruĝajn. Ĝis tiu tempo ĉiuj birdoj vintris en niaj lokoj. Eĉ gruoj nenien forflugis. Kaj la arbaroj somere kaj vintre estis plenaj de folioj, floroj kaj fungoj. Kaj la neĝo ne estis. La vintro ne estis, mi diras. Ne estis! Por kio do ni bezonus ĝin, vintron, bonvolu diri?! Kiun utilon ĝi donas? Murdis la stultulo la unuajn birdojn – kaj la tero ektristis. De tiu tempo komenciĝis la folifaloj kaj la kota aŭtuno, la foliŝiraj ventoj kaj la vintroj. Kaj la birdoj ektimis, ili forflugas de ni, ili ofendiĝis pro la homoj. Do, komprenu, karulo, ke ni mem al ni malutilis, kaj ni devas nenion difekti, sed ĉion gardi.

– Kion ni devas gardi?

– Ekzemple, la diversajn birdojn. Aŭ la arbarojn. Aŭ akvon, por ke ĝi estu trariveble pura. Ĉion gardu, frato, aliokaze vi komencos ĵetadi teron kaj tiel atingos pereon.

Mi esploris aŭtunon persiste kaj longe. Por ekvidi ion en vera senco, oni devas konvinki sin, ke oni vidas tion la unuan fojon dum la vivo. Kaj tiel estis ankaŭ pri aŭtuno. Mi kredigis min, ke ĉi tiu aŭtuno estas la unua kaj lasta en mia vivo. Tio helpis min pli klare rigardi ĝin kaj ekvidi multon, kion mi ne rimarkis antaŭe, kiam aŭtunoj preterpasis min, lasante neniun spuron, krom memoro pri koto kaj humidaj Moskvaj tegmentoj.

Mi eksciis, ke aŭtuno miksis ĉiujn purajn farbojn, ekzistantajn sur la tero, kaj metis ilin, kvazaŭ sur tolon, sur la forajn spacojn de la tero kaj la ĉielo.

Mi vidis foliojn, ne nur flavajn kaj purpurajn, sed ankaŭ skarlatajn, violajn, brunajn, nigrajn, grizajn kaj preskaŭ blankajn. La koloroj ŝajnis aparte molaj pro aŭtuna malhela vualo, senmove pendanta en la aero. Sed dum pluvoj anstataŭ paŝteleco la koloroj ricevis brilon. La ĉielo tegita per nuboj tamen donis sufiĉe da lumo, por ke la malsekaj foraj arbaroj kapablu ekbruli kvazaŭ purpuraj incendioj. En pinaj densejoj tremis pro malvarmo betuloj, superŝutitaj per folia ortavolo. Eĥo de hakilaj batoj, fora intervokado³ de kampulinoj kaj vento de flugiloj de preterfluganta birdo estis forskuantaj la foliaron. Ĉirkaŭ la trunkoj kuŝis vastaj cirkloj de la falintaj folioj. La arboj komencis flaviĝi demalsupre: mi vidis tremolojn, kiuj estis ruĝaj sube kaj ankoraŭ tute verdaj sur la arbopintoj.

Dum iu aŭtuno mi boatis sur la rivero Prorva⁴. Estis tagmezo. La malalta suno pendis en la sudo. Ĝia oblikva lumo falis al la malhela akvo kaj reflektiĝis de ĝi. Strioj de sunaj rebriloj de la ondoj, faritaj de miaj remiloj, egale moviĝis laŭ la bordoj, leviĝante de akvo kaj estingiĝante en la arbopintoj. La strioj de lumo penetris en la densejon de herboj kaj arbustoj, kaj por unu momento la bordoj ekbrulis per centoj

da koloroj, kvazaŭ sunradio trafis al ŝutaĵoj de bunta erco. La lumo rivelis jen brilantajn nigrajn herbajn tigojn kun oranĝkoloraj sekiĝintaj beroj, jen la flamajn ĉapojn de muŝfungoj kvazaŭ sursprucigitaj per kreto, jen la fanditaĵojn de kunpremiĝintaj kverkaj folioj kaj la ruĝajn dorsojn de kokcineloj.

Aŭtune mi ofte atente observis falantajn foliojn, por kapti tiun nerimarkeblan parton de sekundo, kiam la folio disiĝas de sia branĉo kaj komencas fali al tero. Tamen mi longe ne sukcesis tion fari. Mi legis en malnovaj libroj, kiel susuras falantaj folioj, sed mi neniam aŭdis tiun sonon. Folioj ja susuris, sed ili susuris nur sub homaj piedoj. Susurado de folioj en la aero ŝajnis al mi same nekredebla, kiel rakontoj pri tio, ke printempe oni aŭdas, kiel herbo kreskas.

Certe, mi ne pravis. Estis necesa tempo por ke mia aŭdkapablo, obtuza pro la grincado de urbaj stratoj, povu ripozi kaj distingi tre fajnajn kaj precizajn sonojn de la aŭtuna tero.

Foje dum malfrua vespero mi venis en la ĝardenon, al la puto. Mi metis sur la putan trabaĵon mian kerosenan lanternon “Vesperto” kaj elprenis akvon. En la sitelo folioj flosis. Ili estis ĉie. Oni ne kapablus eviti ilin. La nigra pano estis alportata el la bakejo kun malsekaj folioj, gluiĝintaj al ĝi. Vento ĵetadis manplenojn da folioj sur la tablon, sur la liton, sur la plankon, sur la librojn, kaj eĉ paŝi sur la ĝardenaj padoj estis malfacile: oni devis vadi sur folioj kiel sur profunda neĝo. Ni trovis foliojn en poŝoj de niaj pluvmanteloj, en kaskedoj, inter la haroj – ĉie. Ni dormis sur ili kaj estis saturitaj de iliaodoro.

Okazas surdaj kaj mutaj aŭtunaj noktoj, kiam kalmo ŝvebas super la nigra arbara regiono, kaj nur la klakilo de nokta gardisto sonas de la rando de la vilaĝo.

Estis ĝuste tia nokto. La lanterno lumigis la puton, la maljunan aceron apud la barilo kaj la hirtan pro vento tropeolan staŭdon sur la flaviĝinta florbedo.

Mi ekrigardis al la acero kaj ekvidis, kiel singarde kaj lante de la branĉo apartiĝis ruĝa folio, por unu momento haltis en aero kaj komencis oblikve fali al miaj piedoj, kun apenaŭa susuro kaj balanciĝo. Mi unuafoje aŭdis la susuron de falanta folio – neklaran sonon, similan al infana flustro.

La nokto staris super la silenta tero. La disverŝo de la stela brilado estis intensa, preskaŭ neelportebla. La aŭtunaj stelaroj brilis en la sitelo da akvo kaj en la malgranda fenestro de la domo kun same streĉa forto, kiel en la ĉielo.

La stelaroj Perseo kaj Oriono glitis super la tero laŭ sia lanta vojo, tremis en la akvo de lagoj, iĝis malbrilaj en arbustaj densaĵoj, kie ripozis lupoj, kaj speguliĝis sur la skvamoj de fiŝoj, dormantaj sur sablaĵoj de Starica kaj Prorva.

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La unua tago

de Paulo S. Viana



Precize je la 6a horo kaj 15 minutoj S-ro Evaldo malfermis la okulojn. Same kiel dum la pasintaj tridek kvin jaroj. Ankaŭ en sabatoj kaj dimanĉoj, ĉiam je la sama horo kaj samaj minutoj. Ankaŭ hodiaŭ.

Lia unua emo estis rapide ellitiĝi, sed li tuj rekonsciiĝis, ke hodiaŭ li ne bezonas fari tion. Li decidis kuŝi ankoraŭ dum kelkaj minutoj, eble almenaŭ duonhoron. Li baldaŭ malkvietiĝis sur la lito. Li klopodis sin regi, la vetero estis malvarmeta, sed post dek minutoj la lito efikis malkomforte. La tuta korpo fariĝis malpacienca, la littukoj tuŝis lin akre, malagrabla. Per impulso li flankenŝovis la tukojn kaj ekstaris. Io aŭtomate lin puŝis al la necesejo. Ĝuste kiel de tridek kvin jaroj.

Li lavis sian vizaĝon, brosis la dentojn kaj kombis la harojn per sia malnova nigra kombilo. Nun ĉio aspektis normale, kaj li per rapidaj paŝoj ekiris al la kuirejo. “Hodiaŭ mi ne bezonas rapidi”, li pensis, sed ne sukcesis malrapidigi siajn paŝojn.

S-ro Evaldo ĵus ricevis sian pensiĝon. Fakte, hodiaŭ estas lia unua tago kiel pensiulo. Hieraŭ li adiaŭis siajn kolegojn en la oficejo, karesis sian amatan skribotablon, kolektis siajn skribilojn, tranĉileton, glubendon, foton de sia filo, kaj aliajn objektojn en platan sakon, malplenigis siajn tirkestojn je malnovaj paperaĵoj, man-premis la estron, kaj foriris. Ĉiuj simpatie kaj ŝajne iom envie ridetis al li, feliĉulo. Nun li estas libera!

Libera? Por kio?

Subite revenis en la memoron de S-ro Evaldo malnova promeso, kiun li faris al si mem. Li klare revidis la scenon. Li tiam estis juna, naiva ĵusdungito en tiu oficejo de tradicia firma, okupanta modestan sed sekuran postenon kiel komencanto, pro influo de lia patro, kiu havis amikon en la estraro. Vera bonŝanco.

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Poezio en Sorio

de Miguel Fernández



De la 1a ĝis la 4a de majo okazis la 83a Hispana Kongreso de Esperanto en la urbo Sorio (hispane, Soria, pron.: Sorja), apartenanta al la hispana aŭtonoma regiono Castilla y León (Kastilio kaj Leono).

La programo aparte riĉis pri aranĝoj kulturaj, prelegoj, muziko, vizitoj al historiaj lokoj... kio, kune kun la alta nombro da kongresanoj (preskaŭ 170 homoj) plus konsiderinda nombro da neesperantistoj vizitintaj nian tiean buntan Esperanto-ekspozicion aŭ ĉeestintaj niajn programerojn apertajn al la ĝenerala publiko, faras la prian LKK-on inda je aparta gratulo!

Miaflanke, mi kaptis la okazon por, finfine, persone prezenti mian lastan Esperanto-poemaron *Semo de matenruĝoj*, aperigitan de Mondial en 2023 kaj tiujare prezentitan de Miguel Gutiérrez Adúriz kadre de la 108a UK en Torino. Pri ĉi poem-kolekto mi substrekis, ke ĝi vidis la lumon ĝuste 30 jarojn post la apero de la kvaropa poemaro *Ibere libere* kaj de la estiĝo de la t. n. Ibera Skolo, kiu, opinie de respektindaj Esperanto-beletristoj, alportis freŝajn kaj refreŝigajn trablovojn al la Esperanto-literaturo. Same substrekindas, ke la iberaskolanoj agadas plue, jen unuope jen plurope. Ekzemple, la du Miguel-oj (Gutiérrez Adúriz kaj mi mem), krom ke ni ade poemas, novelas, artikolas por revuoj ktp, gvidas (li kiel la sekretario; mi kiel la prezidanto) la iradon de unu el la plej gravaj motoroj de literatura kreo en Esperantujo: la Belartaj Konkursoj de UEA. Do ni proponas grupan agadon por beletrumi en nia verda mondo.

Due, mi sciigis la ĉeestantojn, ke mi rigardas *Semo de matenruĝoj* kiel mian plej maturan poemkolekton. La prologinto, Nicola Ruggiero (ankoraŭfojajn dankon kaj gratulon, kara Nicola, pro via bonega prologo!), de la Akademio Literatura de Esperanto, aldonis ĉi verkon, kune kun mia poemaro *El miaj sonoraj soloj* (1996), al la listo de gravaj Esperanto-beletraĵoj ellaborita de majstro William Auld antaŭ kvarona jarcento. Kiel granda honoro! (Pliafoje plej elkoran dankon, Nicola!) Mi finis mian prezenton per deklamo de mia ĉi-libra jena poemo:

AMPOEMO ĈE LA SOJLO DE VINTRO

Al mia amata Carmen

Jen ni kveras,
spirante vesperruĝojn,
plej buntajn vesperruĝojn en lontano,
nun ĉe la sojlo de serena vintro,
sur supla sablo de la sama strando,
sur kiu ni plektadis
tiom da ĝuo-skuoj,
ellerninte la lingvaĵon de l' kiso,
kontraŭ la bordo de la matenruĝo
en nia fora glora primavero.

Tiam ni faris nia la devizon
– ĉu el greka saĝulo? –,
ke preferindas ami ol amati,
ĉar amanto kunportas kosmon kore.
Sed por ni nune, sojle de la vintro,
kiam pasi' aspiras al tenero,
– spirit-flirtado ĉirkaŭ la eterno –,
amati jam samrangas kiel ami,
ĉar amat' en teneron
turnas sian kor-kosmon de amanto.

Tiam, amo, konkeris ni la kison.
Nun, amo, ni konkeru la brakumon,
ni konkeru la rozon,
ni celebru la rozon,
spirante splendon de unuaj vortoj,
ni konkeru la vintron,
ni celebru la vintron,
ni konkeru la onton,
eĉ nun, kiam ni kombas grizajn harojn,
ke la genepoj vidu,
kiel povas ekĝermi
puraj semoj de puraj matenruĝoj.



Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kaj pro tiaj limoj la homoj mortigas unu la alian

Johansson, Sten. *Neŭtrale*: Originala romano. – Novjorko: Mondial, 2024. – 189 p.



La vortoj de la titolo aperas ne en nuntempa, sed en historia romano de Sten Johansson. En “Neŭtrale” Sten kondukas nin al Skandinavio de la 30aj kaj 40aj jaroj de la pasinta jarcento. Ni renkontas tri personojn, kies vivovojoj interkruciĝas kaj tiel ni ricevas viglan impreson pri la vivo en tiama Svedio.

Unue, la tipografo Ture. Li estas ano de la komunista partio kaj partoprenis en la hispana intercivitana milito je la flanko de la respublikanoj.

En la unua ĉapitro li laboras en la nordsveda urbo Luleå. La 3an de marto 1940 “li vekigās pro terura kra-ko eksterdome”. Kio okazis? Ĉu la rusoj bombis, kiel okazis la 21an de februaro en la proksima urbo Pajala? Montriĝas, ke estas brulatenko kontraŭ la komunista gazeto “Nordluma Flamo”. Kvin personoj mortis, sed la kulpuloj de dekstrema gazeto ne estis kondamnitaj pro tio. Tio jam indikas, ke la justico ne estas vere neŭtrala. Ni ankaŭ spertas, ke estas ĝenerala fobio kontraŭ komunistoj dum la oficiala Svedio aranĝis sin kun la nazioj.

En la dua ĉapitro aperas Gullvi – la ina ĉefpersono. Pere de ŝi ni lernas pri honta makulo de la sveda historio: “rasa higieno” kaj devigitaj steriligoj. Inter 1934 kaj 1976, dum regis socialdemokratoj, la oficiala Svedio steriligis preskaŭ 63 mil homojn, la plej multaj el ili virinoj, pro “mensa malsano”, “ribelemo” aŭ simple ĉar ili ne volis vivi en la limoj de la burĝa socio. Kompreneble, la skandinavaj landoj ne plu fieras pri tiu parto de sia historio.

Sten gvidas nin per Gullvi al la fundo de sveda socio. La patro forestas, la patrino devas labori aliloke. Gullvi vivas ĉe malamika onklino, kies edzo perfortas ŝin. Nevo mortigas tiun onklon kaj poste Gullvi estas transdonita al hejmo por neadaptiĝemaj knabinoj. La nura eliro por ŝi estas konsenti “libervole” al steriligo. Gullvi estas indiferenta al politiko kaj apenaŭ konas la diferencon inter komunisto kaj nazio. Transvivi estas ĉio por ŝi.

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humoristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

Oni estas riĉa neniam sufiĉe ^z

Elon Musk venis al kafejo, kaj ĝiaj vizitantoj tuj iĝis miliarduloj – averaĝe.

Por iĝi miliardulo necesas ne havi grandan salajron, sed pagi la malgrandajn.

Lernolibroj pri ekonomiko instruas: “Donu al la homoj ne monon, sed fiŝkanojn por ke ili mem sin nutru”. Kion efektive ordonas registaraj ekonomikistoj: vendu al la homoj fiŝkanojn kredite kaj privatigu ĉiujn akvejojn. Do ili pagos samtempe la kreditojn kaj la fiŝadon!

Se oni trovas simion kiu kolektus kaj kaŝus pli da bananoj ol ĝi povas manĝi dum ĝia grego malsatas, oni rakontus pri ĝi en lernolibro pri animala patologio. Kiam tio okazas al homo, oni metas ties portreton sur la kovrilon de “Forbes”.

Apple eldonas novajn telefonojn tro rapide, do iliaj aĉetantoj ne havas tempon por pagi kreditojn de la antaŭaj modeloj.

En juĝejo:

- Kial vi rabis la bankon?
- Sed unue ĝi prirabis min!

Kio estas riĉulo? Tio estas homo, kiu sukcesis vendi al la aliaj vekhorloĝon kiu vekos ilin matene por iri al laborejo, kie ili laboros por pagi la vekhorloĝon.

Geedzoj kverelas:

- Se mi scius, ke vi estas malriĉulo, mi neniam edziniĝus al vi!
- Sed mi ekde la komenco diris, ke ĉio, kion mi havas, estas vi!

La riĉeco similas al festo: mi sentas ke ĝi estas proksima, sed certe ĝi ne estas la mia.

Ju pli aĝa estas la riĉa edzo, des pli facile estas ami lin ĝis la morto.

Impostisto akuzas la riĉulon:

- En via impostdeklaro vi indikis nur etan parton de viaj enspezoj!
- Sed kion fari, se la sekcio “enspezoj” en via deklaro estas tro eta, kaj duono de la nuloj ne enspaciĝis?

Plukis **Stano Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Al fina malvenko?

Eldonaĵoj de la Kanada Esperanto-Asocio ankaŭ aĉeteblaj pere de Espereanto-Societo Kebekia (<https://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/>)

Brilaj denaskuloj

Ni memoris pri meritoplenaj esperantistoj kiuj naskiĝis en la jaro 2025. (Zlatko Hinšt: Festo de la 100-a jariĝo de la fondo de Klubo de esperantistaj fervojistoj (KEF) en Zagreb // Tempo, 2025, №1, p. 4)

Ĉu nepiotrkononcebla?

Polaj esperantistoj kongresos en urbo, kiun neniu malpolo kapablas ĝuste prononci... Piotrków Trybunalski (EKO, 2025, №26)

Eraro duoble diabla

Diobla datreveno de f-ino Vermaas (grupo uea-membroj, 23 sep 2021, rimarkis Nicola Ruggiero)

Ne al glavo!

Nia movado bezonas novan sangon. (Trezoro Huang Yinbao, <https://www.liberafolio.org/2025/06/25/fernando-maia-estos-prezidanto-de-uea/#comment-12022>)

Senutila alvetruo

Ĉ. dek partoprenantoj alvenos kavavane (Amri Wandel, grupo uea-membroj, 2 apr 2025)

Krei arte, treni parte

La vicprezidinto de PEN Internacia, Mario Vargas Llosa, evidente partotrenis siajn verkistaraĵn mondkongresojn. (esperantio.net/heko/nia-unua-konta-kto-kun-mario-vargas-llosa, stato 16 ape 2025, rimarkis Ionel Onet)

Ĉu ŝi egan pelton portis?

La felegistino estis ĉirkaŭ kvardekjara, maldika, energiplena virino. (Nemere I. Dum vi estis kun ni. Hyvinkää: Oy Mendoservo AK; Budapest, HEA, 1988, p. 81)

Ne martira kolo

Eseo kaj martikolo (Beletra Edeno, 2025, №12, p. 2.)

Senlige

Krom Honora Membreco, Claude Gacond estis Dumviva membro kaj fakdeligito de UEA. (Esperanto, 2025, №1, p. 22.)

Plukis **István Ertl**

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Usono: Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>